

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 3 2009

Vendredon la 4an de septembro

57a jaro

Kalendaro

(Ni komencas je la 19a horo. Kie? / Hvor? – vd. p. 4 / se s. 4)

Lundon la 7an de septembro (semajno / uke 37) – mandag

Pri la jubilea Universala Kongreso en Bjalistoko raportos Kjell Peder Hoff kaj Otto Prytz.

Rapporter om årets verdenskongress i Białystok (150-års jubileum for Zamenhof) ved Kjell Peder Hoff og Otto Prytz.

Lundon la 21an de septembro (semajno / uke 39) – mandag

La posta sabato, la 26a de septembro, estos la Eŭropa Tago de Lingvoj. Ni legos la raportojn en interreto pri la agado en antaŭaj jaroj kaj kune cerbumos kiel utiligi la eventon. Ekz-sendu leterojn de legantoj kaj ĉu pendigi foliegon antaŭ nia pordo kaj peti la preterpasantajn enmigrintojn traduki al siaj lingvoj iun amuzan frazon?

Den etterfølgende lørdag, 26 september, er Den europeiske språkdagen. Vi leser rapporter fra internett om aktiviteten i tidligere år og diskuterer hvordan vi kan utnytte denne dagen. F.eks. sende leserbrev eller henge opp et ark foran lokalet vårt med en morsom setning som de forbi-passerende innvanderne oversetter den til sine språk.?

Lundon la 5an de oktobro (semajno / uke 41) – mandag

Ĵus reveninte post la jarkunveno de Esperanto-Gården en Lesjøfors (kie nia klubo estas membro) Douglas Draper raportos pri la situacio tie.

Lørdagen før er det årsmøte til kursstedet i Lesjøfors (hvor klubben vår er medlem). Douglas Draper er nettopp tilbake og forteller hvordan det går der nå.

Lundon la 19an de oktobro (semajno / uke 43) – mandag

La juda saĝulo Hillel estas famkonata en Esperantujo kiel la "aŭtoro" de la Ora Regulo, sed Asbjørn Lindh malkovris ke li havas multon pli por oferti. Ankaŭ gustumblos judaj gustumaĵoj.

Den jødiske vismannen Hillel er kjent i Esperantoverdenen som opphavsmannen (?) til Den gyldne regel, men Asbjørn Lindh har funnet ut at han har mye mer å by på. Det blir også smakebiter av jødisk mat.

OKAZIS

Lundon la 20an de aprilo

Ni rigardis la testamenton de Nobel pri la pacpremio kaj diskutis pri la atribuoj de la premio. Certe necesas reinterpreti la kondiĉojn de la testamento por la nuna mondo, sed laŭ la kritiko de Fredrik Heffermehl oni ne rajtas fari tion laŭ sia bon-trovo: Nobel celis subteni la strebojn de aktivaj pacmovadanoj por krei novan pacan mondordon, bazitan sur solvo de internaciaj disputoj per arbitracio. Ni disdonis kopiojn de la pria artikolo en *Monato* 2/2009.

Lundon la 4an de majo

Kjell Peder trovis la Printempan Seminarion Internacian (PSI) en Germanio eĉ pli interesa ol li antaŭvidis. La programo estis riĉa kaj varia, precipe la ekskursoj en la vasta nacia parko Harz, kie situas la kunvenejo, la domo Sonnenberg. Li reportis multajn informilojn pri aranĝoj tie – kaj prenis tien librojn el nia stoko por donaci/vendi. Partoprenis en la PSI ankaŭ eks-osloklubano Marianne Lund kun sia familio (ili loĝas en Tromsø). Artikolo en loka gazeto – kaj ankaŭ Kjell Peder – povis atesti ke ŝi bone aktivis en la aranĝo kiel gvidanto de junulara orkestreto. La venontjara (26a) PSI okazos samloke.

Lundon la 18an de majo

La temo estis stenografio. Douglas unue diris iom pri la tri plej multaj uzataj sistemoj - Gabelsberger en Germanio kaj Skandinavio, Pitman en Anglio kaj Gregg en Usono. Poste li donis fulmlecionon pri Gregg, kiun li mem lernis el libro kiel junulo kaj poste daŭre praktikas, ankaŭ adaptinte ĝin al Esperanto.

Lia motivo por eklerni ĝin siatempe estis ne por povi skribi rapide, sed ke ĝi kombinas la avantaĝojn de la ĉina kaj la alfabetaj skriboj: en la ĉina ĉiu vorto havas karakterizan formon, dum ĉiu latinlitera vorto estas (preskaŭ) nur rektangulo. Sed alfabetan skribon oni pli rapide lernas, ĉar ĝi havas malmultajn literojn kompari kun la ĉina signaro.

Oni povas komence ekpraktiki nur parton de stenografia sistemo, ekz-e nur la mallongigojn por afiksoj, ankoraŭ uzante la latinajn literojn, ekz-e "f-pel-d" anstataŭ "forpelado".

Lundon la 25an de majo: Ni anoncis kromkunvenon pri la ĵusa sveda kongreso, sed venis preskaŭ neniuj. Ankaŭ **lundon la 1an de junio** kunveno ne okazis.

Lundon la 15an de junio

Iu devis foriri frue, alia venis poste, do nur neformale ni interparolis pri la norvega kaj la sveda kongresoj kaj pri planado pri somera helpagado en Lesjöfors kaj pri la venontaj gastoj.

Jarkunvena raporto

london la 2an de marto 2009

Jarraporto 2008: Ni aprobis la dissenditan jarraporton, kun diversaj aldonetoj kaj ŝanĝetoj (vd. apartan folion). Ni pretas sendi la korektitan tekston al petantoj.

Jarkalkulo 2008: Post ĝustigo aprobis ĝin eksterordinara ĝenerala kunveno la 4an de majo — kondiĉe ke la revizoro ne havos rimarkigojn . Vd apartan folion.

Elektioj. Elekta komisiono ne estis nomumita.

Ni faris la jenajn reelektiojn: **Prez.** Kjell Peder Hoff; **vicprez.** Cato Haugen; unu **sekretario:** Douglas Draper; la alia vakas; **anstataŭantoj** Heming W. Thorbjørnsen* kaj Pepita de Caspary, sub la kondiĉo ke la anstataŭantoj akceptas reelekton. **Revizoro** Terje Meier, **vicevizoro** Kristina Nygård.

Kiel reprezentanton en la **domkomisiono** ni elektis Cato Haugen, kaj kiel anstataŭanton Kjell Peder Hoff.

*Posta eksterordinara ĝenerala kunveno la 4an de majo elektis Heming W. Thorbjørnsen **estrarano**.

Lernemuloj *Nye interesserte*

ĈE NIA INFORMBUDO en la Mela-festivalo en aŭgusto ni kolektis adresojn de deko da interesiĝantoj. Nun ni aranĝos informkunvenon en la venonta semajno por interparoli pri eventuala kurso aŭ memstudado kun subtenaj kunvenoj. **Ĉu interesiĝus pri tio iu via parenco, najbaro aŭ kolego?** Irigu ŝlin al ni la venontan mardon aŭ merkredon je la 18a!

*VED VÅR informasjonsbod på Mela-festivalen i august samlet vi adressene til et titalls interesserte. Nå arrangerer vi et lite info-møte for å snakke med dem om muligheten for et eventuelt kurs eller selvstudium med støtteopplegg. **Kunne noen du kjenner være interessert?** Send dem til oss førstkommande tirsdag eller onsdag kl. 18!*

DD

Someraj gastoj

La eksterlandaj gastoj malmultas ĉi-somere — eble pro la reorganizado de Pasporta Servo. Nur juna hungara paro, kiu trajnis tra Flåm al Bergeno, kaj franca veteranino, kiu partoprenas en seminario de radioamatoroj, kiuj poste ekskursos al Svalbardo (!)

Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? Vil noen leie møterom?

POR KOVRI la plialtiĝintan domluon ni volas **luigi nian kunvenĉambron** al eksteruloj. Ni nun havas unu luonton (por la dimanĉoj), sed bezonas pliajn.

Ĉu vi scias pri organizo aŭ grupo kiu volus lui por vespero(j)? Broŝuro kun detalaj informoj kaj bildoj haveblas.

FOR Å DEKKE den økte husleien prøver vi å få leid ut møterommet vårt til andre organisasjoner. Vi har nå én leietaker (for søndager), men trenger flere. Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie for en eller flere kvelder? Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.

Ĉu vi volas aĉeti librojn aŭ insignojn? / – kjøpe bøker .. ?

Ekz-e la novan lernolibron de Stano Marĉek *Esperanto – direkte metode* (danan aŭ la klasikan *Fenomenet Esperanto* aŭ insignojn (verda stelo)? Nia klubo (kiu en novembro transprenis la librovendadon de NEL (kiu mem transprenis de la Eldonejo en 2007)) ĝenerale ne importas stoketojn, sed povas havigi 3 ekz el eksterlando se pluraj membroj mendas.

Ruĝaj glumarkoj / Røde klistremerker

Ni ankoraŭ vendas ruĝajn glumarkojn (4 x 7 cm). Por valizo, dorsosako, teko Po 2 kronoj.

Kluba biblioteko – denove alirebla, nun malsupre

Post la renovigo kaj farbado de la muroj kaj planko malsupre en la antaŭa vestejo, la domkomisiono elpakis la librojn de la kluba biblioteko kaj metis ilin en novan librobretaron tie.

Kunvenejo ("Esperantonia") Olaf Schous vei 18 (enirejo en Schouterrassen) en Sinsen. Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj de tie iru supren laŭ Båhusveien – aŭ malsupren de Sinsen T (buso, metroo) aŭ Sinsenterrassen (tramo).

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo.Tlf. 22 35 08 94
www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: [oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)
Poŝtĝiro 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL 0533 05 22870).